

Intervjuo kun la polo Walter Zelazny pri lia impresoj pri Svislando

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-845/333, 1979 decembro 20 kaj 22

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-50->

[/Radioprelego 845 SRI 333 1979 12 20 22 Intervjuo kun la polo Walter Zelazny pri lia impresoj pri Svislando.mp3](#)

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude Gacond kun la polo Walter Zelazny. Dum du semajnoj pola studento kaj pli kaj pli art-forĝisto, kiu estas membro de la komitato: Pola Studenta Esperanto-Komitato, restadis en Svislando. Li nomiĝas Walter Zelazny kaj venis, interalie, por intimiĝi kun la aktiveco de la esperanto-organizaĵoj, kies sidejo troviĝas en La Chaux-de-Fonds, tio estas: Centro de dokumentado kaj studo pri internacia lingvo (CDELI), Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Literatura Foiro, kies pola kunlaboranto li fakte estas. Sinjoro Walter Zelazny ne nur restadis en La Chaux-de-Fonds, sed ankaŭ en Ĝenevo. Sinjoro Walter Zelazny, kion vi fakte opinias pri Svislando, kaj ĉu tio, kion vi vidis similis al tio, kion vi antaŭvidis?

WZ.- Oni povas diri, ke en Eŭropo estas kelkaj stereotipoj pri Svislando. Al ĉi tiuj stereotipoj apartenas jenaj nocioj: la Svislando estas riĉa, justa, demokratia, konfederacia lando. Do tion mi portis antaŭ ol mi venis. Pri riĉeco, justeco, demokratio, konfederacia karaktero de la ŝtato mi ne dubis. Fakte tio, kion mi vidas konsentas kun miaj antaŭaj opinioj. Kompreneble mi havis la ideon de Svislando, mi aŭdis ĉe aliaj miaj konatuloj, kiuj vizitis Svislandon, ke tuj post la trairejo de la landlimo, la Svislando estas alia ol Eŭropo. Mi ne volis kredi, ĉu la tero estas alia, ĉu la ĉielo estas alia, fakte estas io svisa en Svislando. Io, kion mi povas nomi la fenomeno de Svislando.

Cl.- Kaj kio estus tiu fenomeno? Provu difini ĝin, ĉar por ni estas malfacile scii, kion vi sentas malsimila al aliaj lokoj.

WZ.- Do, unue, fizike mi povas diri, ke aspekto de Svislando estas alia. Estas iomete aliaj domoj, iomete aliaj manieroj de homoj. Sed svisaj homoj estas pli afablaj ol okcidentaj ĝenerale, tion mi fakte sentas. Kaj kio spirite diferencas la svisojn: tiu sento al propraĵo, ke ĉio, kio estas ĉi tie unue apartenas al mi, poste al la komunumo, poste al la kanton, poste al la ŝtato. Do oni povas diri, ke la laŭvico de svisa, svisulo estas inversa ol penso de aliaj ŝtatanoj.

Cl.- Sinjoro Walter Zelazny, mi scias, ke vi multe interesiĝas pri la politika vivo de ĉiuj landoj. Do, ĉu ankaŭ vi konas iomete la svisan eksterlandan kaj ankaŭ eble enlandan politikon?

WZ.- Jes, mi povas diri, ke fakte svisoj fieras pri sia neŭtrala starpunkto en internaciaj rilatoj. Ĝis nun svisoj ne konsentis esti membroj de unuigintaj ŝtatoj, same ne eniris la Eŭropan Komunumon. Sed mi ne nomus, tiun politikon neŭtrala. Mi dirus, ke ĝi estas neŭtralisma. Se mi diras, ke la svisa politiko estas neŭtralisma, tio signifas, ke neŭtralismo estas la ideologia skolo de svisoj. Tio ne signifas, ke svisoj estas neŭtralaj al io kio okazas en la mondo. Ili elektis neŭtralismen, ne neŭtralecon. Neŭtralismen, kiel la metodon de sia vivo. Tio signifas, ke por ili plej bone estas ĝuste konservi neŭtralismen. Kion signifas tio? Tio signifas, ke okazas multaj maljustecoj en la mondo. Ekzemple estas ĉe svisoj konate kaj svisoj interparolas pri tio, ke en svisaj bankoj troviĝas la mono de kelkaj personoj, kiuj fakte barbarece agadis en siaj landoj. Oni diras pri diversaj legendoj, tamen en ĉiu legendo estas iomete da vero. Ni prenu ekzemplon de Bokassa, ni prenu la ekzemplon de Shahin shah,

irana. Mi pensas, ke monoĵ, kiuj estas en Svislando, multe devenas de maljusteco. Mi miras, ĉar svisoj pri tio scias, ĉiuj pri tio scias. Sed estas fakte io en Svislando mem, mirinda. Ĉiuj scias pri tio, ĉu svisoj, ĉu ekzemple poloj, kaj ĉiuj estas finfine kontentaj, ke tiel estas.

Cl.- Sinjoro Walter Zelazny, ni tuŝu alian temon, kiu eble revenu al esperanto. Vi eble povus kompari la polan kaj svisan esperanto-movadojn. Kiun impreson vi havas tiurilate?

WZ.- Eble mi ne diros pri la nombro de esperantistoj ĉar fakte Pollando estas pli granda lando, proporcie havas pli multe da esperantistoj. Sed interesaj estas tendencoj. Tre similaj estas svisaj kaj polaj tendencoj en esperantujo. Tio iomete ŝokas min. Unue, Pollando estas tre ununacia lando. Svislando estas diversnacia, diverskantona lando. En Pollando mi povas diri pri almenaŭ tri fortaj movadoj. Movado ligita kun Universala Esperanto-Asocio, aparta aktiva katolika agado kaj studenta. Tio ne eblus, mi pensas, en aliaj socialismaj landoj, en kiuj la politika vivo grupigas ĉe unu linio, socialisma, same kiel en Pollando, sed samtempe en pli-malpli alia formo. Sed formoj de politika pola vivo estas pli mozaikecaj kaj tio estas similaĵo al Svislando. Sed ankaŭ oni povas diri ion alian. En Svislando aperis fakte mondskala fenomeno en esperantujo. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista (KCE), Literatura Forio kaj ĉefe Centro pri la dokumentado kaj esplorado de la lingvo internacia (CDELI). Ĉi tiu centro respondas iusence al studenta movado en Pollando. Tradicia movado de svisoj apartenas al UEA. Tio kio estas en Pollando same. Katolika vivo estas specifa karaktero de Pollando, sed ĉi tie ankaŭ ni povas diri ke la movado de esperantistoj grupiĝas ĉe kelkaj aliaj ideoj ĝis nun ne aligitaj al esperanto, fakte, en la religiaj movadoj aperas tie, alie la esperanta sento kaj tiel plu. Do, mi vidas iun similecon.

Cl.- Alian similecon ni vidu ke ambaŭ landoj havas du fortajn elsendejojn, do Pola Radio kaj Svisa Radio, ĉu ne, uzas esperanton regule.

WZ.- Jes, Pola Radio uzas esperanton kaj multe da tempo dediĉas al esperanto-movado. Svisa Radio, kion mi ofte aŭdas en Pollando, uzas esperanton kaj pere de ĝi esperantistoj povas fakte fieri pri sia kultura lulilo père de radio. Fakte la Pola Radio kaj la Svisa Radio havas ankaŭ tiun trajton.

Cl.- Sinjoro Walter Zelazny, fine de tiu babilado pri Svislando kaj via restado en Svislando, ĉu vi havas apartajn dezirojn lige kun via nuna ĉeestado ĉi tie?

WZ.- Jes, mi havas multajn. Unue mi havas piajn dezirojn, kiuj ne realiĝos do mi lasas ilin, kaj realajn, kiujn mi volas konservi. Al piaj apartenas kion mi volas mencii, la fakto, ke mi dezirus al svisoj esti pli kaj pli ligitaj kun la aliaj landoj, kaj la reala apartenas al tio, ke mi vidas en La Chaux-de-Fonds, en tiuj tri institucioj kiuj ekzistas en Svislando, plej gravan nune surmonde eblecon science okupiĝi pri esperanto. Tio signifas ankaŭ kulture. Tion mi esperas, ke svisoj kaj poloj scipovos fari komune ankaŭ.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis Walter Zelazny. Ĝis reaŭdo!